# Aŭstraliaj Esperantistoj

Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj — Nia Espero Nia Forto

Novaĵa Letero de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**

NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

12/12/2011 Deksesa Eldono 2011

Mallongaj Informadoj, Diskutoj, Sugestoj, de vi kaj ni.

Se vi trovas bonan informon informu Aŭstraliajn Esperantistojn.

**Ni invitas ĉiujn Esperantistojn kontribui al tiu novaĵa letero.**

Kondiĉoj estas mallonga letero, pri kaj en Esperanto, kun via nomo.

**Via letero ne estos korektita kaj vi respondecas pri ĝia enhavo.**



**Pensu!**
**Kritiku!**
**Laŭdu!**
**Skribu!**
**Progresu!**

---

Tiu ĉi letero havas "Hyperlinks" al retpaĝoj KLAKU! KLAKU! KLAKU!

---

Sendu novaĵojn, leterojn, informojn al Roger rspring@tpg.com.au; kaj kopiojn al Ivan ivan@melburno.org.au;

---

## Tajpu la esperantajn literojn

**Por vindozaj komputiloj.**

**Ek! - Esperanto** ctrl+click to follow link

Tajpi - Installation ctrl+click to follow link

Apple-Macintosh komputiloj Click! Macintosh.zip

## La epoŝta programo *"gmail'*

**de Google** transsendas la esperantajn literojn tute bone (kontraste kun yahoo.com).
Kun Yahoo uzu "plain text" (ne html)
Keyman Desktop Light 7.1, kiu estas aĉetebla perrete. Uzu Esperantajn literojn

Traduku angla ĝis Esperanton komputile uzu **http://itranslate4.eu** **(Sed poste korektu ĝin)**

---

## Rekomendatan Legadon

---

"*Mirmekobo*," ĉe mirmekobo.com
de Donald Broadribb

---

"Tamen Plu" de Bob Felby
esperantobob@bigpond.com;
Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj

---

"Esperanto sub la Suda Kruco" de AEA
www.esperanto.org.au info@esperanto.org.au

---

La retadreslisto estas uzata por elsendu Esperantajn Gazetojn (post ies peto). Mi ĉiam uzas "Bcc" (Blind carbon copy) lokon por konservu la adresojn sekreta.

"Aŭstraliaj Esperantoj" ne estas ligita al iu ajn periodo. Do la informo povas esti akurata.

---

Mi enmetu en la novaĵletero sencezurajn opiniojn se vi skribas mallonge kaj Esperante.
Ne gravas ĉu mi ŝatas aŭ ne.
Kaj kun la Esperantaj literoj mi petas.

---

**La novaĵletero estas sendata al 181 retadresoj.**

**Informu la Australiajn Esperantistojn pri viaj ideoj**

---

Mi metis senpagan Freeland vortaron en mian komputilon kaj trovas ke ĝi estas tre uzebla.
http://www.freelang.net/dictionary/esperanto.php

---

Saluton, la jeno estas mia respondo al Bob

Saluton,

Unue mi volas pardonpeti ĉar mi antaŭe rimarkis ke kvarono de tiuj ĉi leteroj en nia letero estis angle (ankaŭ mi neniam antaŭe skribis al tiu ĉi letero),
Mi unue elektis la anglan ĉar estas multaj komencantoj kiuj ne jam flue regas Esperanton kaj mi volis ke ili povus senlaciĝe legi pri la grava laboro de AEA, tamen ĉar unu el viaj legantoj volas ke mi transskribi ĝin, mi feliĉe faros tion!
Kiel direktoro de publikeco de AEA, mi estis aprobita por krei filmadan konkurson kiu okazos post la ekkomenco de la venonta januaro, kaj daŭros ses monatojn. Ĝi nomiĝas "The Film' konkurso" La baza ideo de tiu ĉi

konkurso estas por allogi mal/junajn reĝisorojn kaj aktorojn en Aŭstralio al Esperanto pere de financa instigo. La premio de la konkurso estos 500$. Tamen estas unu problemo, se reĝisoroj ktp volus atingi ĉi premion ili devas unue krei filmon Esperantan, tamen kiel aktoro mi scias ke ne estas multaj Esperanteparolantoj en la filma komunumo, do mi devas krei liston de volontuloj kiuj povus helpi traduki la teatraĵojn de la reĝisoroj ktp Esperante. Do se vi estas Esperantisto, kaj pensas ke via Esperanto estas sufiĉe, tiam ne hezitu, kaj sendu vian nomon al mi ĉe la jena retpoŝtadreso: informado@esperanto.org.au
Dankon Richard Delamore

Kara Roger !
Tre koran dankon, kaj dankon ankaû al Richard, kiu tiom rapide tradukis sian verkon. Mi esperas, ke mi ne ofendis lin ! Esperanto-gazeto estas Esperanto-gazeto, kaj angla gazeto estas angla gazeto, chu ne? Se ni permesas al unu verki siajn komtribuajhojn en sia gepatra lingvo, tiam ni permesu tion ankaû al chiuj aliaj samideanoj. La rezulto estus, ke nia Esperanto-gazeto plenighus de artikoloj en la dana, germana, portugala, hungara, nederlanda ktp. ktp. Zamenhof certe ne volus tion. Lia celo estis, ke ni chiuj unuighu kaj parolu la saman lingvon. Pardonu, mi forgesis mencii ankaû la islandan lingvon, kiu ne estas facila !
Plej amike, Bob Felby

Karaj
Mi kunsentas kun Bob pri la letero skribigita en la angla (#14).
Sed, esperante trovi helpon de tiuj ne parolas Esperanton, en la kreado de filmoj, estus utile montri al ili la kialon de la peto.
La petanto povus ankaŭ mencii la grandan nombron de la ricevantoj.
Margaret Chaldecott

Kara Roger,
Jen nova rakonto kiun mi tradukis:
http://www.youtube.com/watch?v=oWm5rs-jfsQ
Aŭstraliano laŭtlegas gxin. (6 minutaj)
http://www.youtube.com/watch?v=arqNvoKJtYU
Prelego pri edukado de infano en 4 lingvoj (37 minutaj)
Amike, Nicole

Esperanists en Viktorio venis kune ĉe la Carlton Biblioteko en Melbourne hieraŭ festi, kun naskiĝtaga kuko, la 152a naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof, la fondinto de nia universala dua lingvo. Marcel Leereveld bonkore malfermita kaj gvidis la okazaĵojn. Tio ĉi estis sekvita de la festa parolado, la rakonto de "Silenta Nokto" , sekvita de rava muzika duopo de Fluto kaj Violono, melodioj sur la sakŝalmoj kun detala priskribo de ĝiaj internaj funkciadoj.
Amuzo kun Esperantaj vortoj kaj la tranĉeo de la kuko, ĉirkaŭigita de manĝaĵo kiu estis konsumita dum la vespero. Ni fermiĝis kun kristnaskkantoj kaj “La Espero”.
Ĉiuj kiu venis laborita malfacile fari ĉi tiu vespero sukceso.
Niaj pensoj daŭre restis kun Ivan and Heather.

EFNSK.
27 venis al Zamenhofa festvalo ĉe Esperanto Domo.
Komensis je 12 tagmezo kaj manĝo kaj trinko atendas la alvenulojn
Je 12.30 ptm ni cirkaŭ regardis la novan ĝardenon kaj gastĉambron.
Tiam ni iris al la dua etaĝo por la bonvena parolado de Roger Springer
Richard parolis pri li filma projekto
Poste estis la pupoj de Dennis Murphy Estis tre profesia teatro taŭga por infanoj kaj plenkeskuloj
Tiam ni regardis la filmon de Sam Green “The Universal Language” Historia filmo pri Esperanto. Bonega Filmo.
Tri Esperantisto de la centra marbordo kantas du belajn kantojn.
Poste ni rekomencis mangi, trinki, paroli.
Estis bona Zamenhofa tago.
http://www.youtube.com/watch?v=xzM-4-kYg4I

Kara Roger,
Mi sendis mian filmeton al la duopo Kajto kaj ricevis tiun respondon. Amike, Nicole

Kara Nicole
Multan dankon por via retletero, mi dzjois rigardi 'la Kanguruo raportas' kaj rekonis la lokon kaj kelkaj homoj.
Nekredeble ke jam unu jaro pasis! Ni gardas bonegajn memorojn!
En julio ni prezentis nian novan Esperanto-KD (Duope) en Kopenhago en Danlando. Ni tie ankau gvidis kantatelierojn.
Venontvendrede ni iros al Bruselo (Belgio) por tie koncerti sabate, ni antaudzjoas.
Ni esperas ke vi fartas bone!
Bonvolu kore saluti la aliajn Esp. amikojn de ni!
Varman brakumon de Nanne kaj Ankie

PLAGIATOJ & INSULTOJ
Mi ĵus legis en ĵurnalo amuzan liston de konataj plagiatoj kaj insultoj.
Usona distristo, Jimmy Durante, iam diris: "Mia edzino havas etan parol-malhelpon. Foje ŝi ĉesas paroli por enspiri."
Redaktoro: "Via manuskripto entenas kaj bonaĵojn kaj malbonaĵojn; sed la bonaĵoj estas neoriginalaj, kaj la originalaĵoj estas nebonaj."
El Ezekiel en la biblio (laux mia scio neniam laŭtlegata en preĝejo): "Samaritanoj similas al putinoj kiuj amor-avidas kunulojn kun gener-organoj kiuj similas tiujn de azenoj kaj elĵetajxo kiu similas tiun de ĉevaloj."
Sigmund Freud rimarkigis, ke la unua homo, kiu forĵetis insultojn anstataŭ ol ŝtonojn estas la fondinto de la civilizacio.
Bette Davis (pli bone citita angle) pri preterpasanta holivud-stelulino: "There goes a good time had by all".
Respondo de Margot Asquith al silent-film-stelulino, Jean Harlow, kiu insultete prononcis la "t" en "Margot": "La 't' en mia nomo estas silenta – same kiel la 't' en 'Harlow'."
Prezidento Lyndon Baines Johnson pri estonta prezidento, Gerald Ford: "Tiu stultulo ne kapablus eĉ furzi kaj samtempe maĉi gumon."

Amike, Max Wearing.
(Bondezirojn por rapida resanigxo, Ivan!)

Mi volas nur sciigi vin, ke vi skribas en la informletero - sen konatan retadreson...
post 'sen' oni neniam uzas la akuzativon...
Amike, Robert.
Dankon Oni neniam ĉesas lerni RogerS

Mi kredas ke se oni prokrastas ĝis perfekto, vi faras nenion, ĉar la morto atendas vin.

Kara Roger,
Dum mi sendas cxi tiun mesagxon mi esperas ke multaj inter vi gxuas Zamenhofan Feston cxe Esperanto-Domo..
Mi volas danki vin pro Telopeo kiun mi legas avide por informigxi pri la pluraj aktivaj grupoj en NSK.
Se iuj inter viaj membroj kaj novaj lernantoj deziras fari la novan intensan 125 interretan kurson de ILEI, petu ilin sendi sian nomon kaj retadreson al mi. Ili ricevos informon en la nova jaro por komenci la kurson la 23an de marto, 2012. Gxi finigxos la 26an de julio, 2012.
Mi deziras al vi cxiuj felicxan, pacan kaj bonsanan festosezonon kaj gxojigan gastigadon de ges-oj Vergara.
Mi certas ke cxiuj cxe la Esperanto-kurso lernos multon de li.
Se iuj inter viaj membroj kaj novaj lernantoj deziras fari la novan 125 interretan kurson de ILEI, petu ilin sendi sian nomon kaj retadreson al mi. Ili ricevos informon en la nova jaro por komenci la kurson la 23an de marto, 2012. Gxi finigxos la 26an de julio, 2012.
Amike, Jennifer AEA Direktoro de Edukado

Dankon, Rog'ero, pro viaj elsendaj'oj. Pardonu pro la manko de Esperanto-supersignoj; mi estas tro maldiligenta kaj tempo-povra por korekti tiun mankon. Mallonge: mi j'us legis en Telopeo, ke Blato estas familinomo en Jugoslavio! Sed ne plu ekzistas tiu lando. Blato ankau' signifas, en la serbo-kroata, malpuraj'o au' koto. Parenteze, en la indonezia, koto signifas urbo :) Plej amike Vera